11e JAARGANG No. 11 VERSCHIJNT MAANDELIJKS 15 NOVEMBER 1949

La Progresanto

REDACTIE-COMITÉ G. P. DE BRUIN G. J. DEGENKAMP F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 2.— per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT H. KUYT JAC. LEM JR. J. VAN SCHEEPEN H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

PRO KIO NI GRAMATIKUMAS?

Ni ne malkaŝas sekreton, dirante, ke la esperantistoj ŝatas gramatikumi.
Ne nur la kompetentuloj inter ni volonte okupas sin pri gramatikaj problemoj, sed eĉ komencantoj montras la inklinon cerbumi pri tiaj temoj.
Komparante la studadon pri Esperanto kun tiu pri aliaj lingvoj, ni konstatas la jenan diferencon: en ĉiu lingvo oni klopodas lerni la regulojn, ne demandante al si: kial tio ĉi estas tia kaj tio alia; en Esperanto tamen oni demandas la kialon. Kaj eĉ la komencanto esploras la motivojn.
Sendube la „artefariteco" de Esperanto estas unu el la kaŭzoj de tiu ĉi fenomeno, ĉar en Esperanto ne ĉio estas tiel fiksita per reguloj kaj laŭ tradicio kiel en la naciaj lingvoj, pro kio restas certa spaco por formi propran opinion pri kelkaj lingvaj elementoj.
Sed niaopinie tio ne estas la sola kaŭzo. En nia propagando ni kutimas emfazi la praktikon: ni praktiku Esperanton por celoj diversaj kiel sindikata movado, politiko, turismo, religio, komerco k.t.p. Per tio ni esperas „kapti" la praktikemajn homojn. Sed, ĉu ni efektive „kaptas" ilin?
Certe, de temp' al tempo tia viktimo falas al ni en la manojn. Sed estas nefacile ankaŭ teni lin, ĉar la praktika aplikado de la lingvo ne estas jam tiom disvastigita kiom ni dezirus.
Granda nombro da esperantistoj ne estas sufiĉe praktikema, sed idealista. Oni multe revas pri la praktika uzado de la lingvo, kaj al tiu celo dediĉas parton de sia vivo, sed.... mem okupi sin pri la praktiko multaj ne povas aŭ ne deziras. La aktivaj idealistoj sentas zorgon por la propagando, pri la organizo, pri siaj kursoj aŭ aliaj okupoj, sed ne pri la praktika flanko. Ni konstatas, ke eĉ la t.n. per-esperantistoj, por kiuj Esperanto estas neniom pli ol rimedo por celo alia, en kongresoj praktikas la lingvon preskaŭ ekskluzive por diskuti pri organizaj aferoj.
Kaj la vera praktiko?

Sed ne pri tio volas atentigi. Ekzistas krom malmultaj praktikuloj kaj multaj idealistoj eble same tiom multaj esperantistoj, kiuj okupas sin pri Esperanto el amo al la lingvo mem. Kaj, se ni estas sinceraj al ni mem, ni eble sentas nin en granda plimulto altiritaj al la lingvistika flanko, kaj eble nur la multaj okupoj malhelpas la funkciulojn inter ni dediĉi sin pli aktive al la lingvo.
Se nia opinio estas ĝusta, ne estas mirige, ke esperantistoj pli gramatikumas ol homoj kiuj por profesia celo studas alian lingvon. Kaj tiu fenomeno certe restos tiom longe, kiam nia movado bezonos idealistojn kaj lingvoamatorojn. Nur kiam Esperanto eniros sian veran praktikan epokon, la idealistoj vidos sian taskon finita, kaj nur tiam Esperanto estos lingvo egala al alia lingvo. Ĉu ankaŭ tiam la gramatikemuloj ankoraŭ trovos terenon por sia amatora laboro, ni ne aŭdacas aserti, nek nei.
Sed provizore ili ankoraŭ havas sian taskon, feliĉe! Kaj se estas vere, ke Zamenhof ĝuste por ili lasis en sia lingvo diversajn nedifinitajn punkojn, ni ne grumblu, sed speciale pro tio danku lin!

Kaj post tiu ĉi malpeziĝo de la koro ni trankvile daŭrigu nian gramatikumadon!

H. KUIJT.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

VOORNAAMWOORDEN (pronomoj).

Om herhaling van namen van zelfstandigheden te voorkomen, maakt men gebruik van voornaamwoorden, bijv.: *Johano estas prudenta knabo, li* (Johano) *studas diligente*. Zij noemen ook wel kenmerken van zelfstandigheden, ook dan komen zij in de plaats van een naam, bijv.: *Petro posedas du kostumojn; tiu ĉi estas lia* (de Johano) *pli bona*.
De voornaamwoorden worden in soorten onderscheiden; noemen zij kenmerken van zelfstandigheden, dan noemt men ze: *Bezittelijke voornaamwoorden* (posedaj pronomoj).
Deze voornaamwoorden hebben dezelfde uitgang als de bijvoeglijke naamwoorden, n.l. A, en ondergaan dan ook dezelfde veranderingen als de zelfstandige naamwoorden waarop zij betrekking hebben, bijv.: *Mi parolas pri MIA patro. Mi vizitis LIAN familion. Mi vizitis LIAJN amikojn.* De bezittelijke voornaamwoorden zeggen ons, dat een zelfstandigheid het bezit is van de 1e, 2e of 3e persoon, bijv.:
1e persoon enkelvoud: *mia hundo.*
1e persoon meervoud: *nia hundo.*
2e persoon enkelvoud: *via hundo.*
2e persoon meervoud: *via hundo.*
3e persoon enkelvoud: *lia (ŝia, ĝia) hundo.*
3e persoon meervoud: *ilia hundo.*
Men merke op, dat in de 3e persoon meervoud het geslacht van de bezitter niet wordt genoemd; de meervoudsvorm voor *LIA, ŜIA* of *ĜIA* is *ILIA*.
Nog enige voorbeelden: *Mi deklamis en mia grupo. Ni neniam forgesos niajn gepatrojn. Antaŭ jaro Johano ricevis de Petro dek guldenojn; li forgesis redoni lian monon. Mario vizitis la gepatrojn de Rozinjo; ŝi vizitis ankaŭ ŝiajn geonklojn. La hundo mordis la katon, ĝi ne timis ĝiajn ungojn. La viro admonis la knabojn, li mallaŭdis ilian konduton.*

Opgave 11. Vertaal in Esperanto:

Mijn ouders heb ik nooit gekend; zij zijn jong gestorven. Heeft U hun nieuwe huis al gezien? Het is zo juist gebouwd. Noch hij noch zijn broer zijn esperantisten. Als je hun zorgen kende, zou je hen zeker helpen. Besteed meer aandacht aan Uw schrift, het is over het algemeen slecht. Jan en Piet zijn beiden esperantisten; Jan is de bekwaamste. Nog nooit heb ik Parijs, de hoofdstad van Frankrijk, bezocht. Heeft U ook mijn Italiaanse gast gezien? Het spijt mij, ik heb geen italiaan ontmoet. Onze voorouders waren germanen. Vele duitsers leren Esperanto, de wereldtaal. Nadat zij gegeten hadden, waste moeder het eetgerei.

Vertaling van opgave 9.

Li hontis pri 1) la konduto de sia filo. La viron 2), kiu iras tie, mi ne konas. Post kiam ili estis trinkintaj 3), ekestis vera festo 4). Johano, ne kondutu 5) kiel malgranda knabo 6). Promenante, ni atingis la vilaĝon. Jen kaj jen 7) mi eraras ĉe 8) la tradukado 9). La prezidanto demandis al la sekretario, ĉu la tagordo 10) por 11) la kunveno jam estas 12) preta. Ne imagu 13), ke vi estas la mastro 14). Ĉu vi rompis ĉi tiun 15) glason? Pro 16) la ventego 17) ĉiuj fenestrovitroj 18) rompiĝis 19). Li ne konscias 20) pri sia forto. Vi venas ĉiam, kiam mi estas manĝonta 21). Ĉesigu 22) tiun babiladon; mi ne povas aŭdi miajn proprajn vortojn. Se li estus askultinta mian konsilon, la akcidento ne estus okazinta 23). La pasintan monaton mi aĉetis novan kostumon; ĝi jam nun estas eluzita 24).

1) Ook wel: *pro*, waarbij men dan de zin beschouwd als antwoord op de vraag: *pro kio li hontas?* 2) Niet: zonder N; dit is een samengestelde zin, welke bestaat uit twee volzinnen: *La viron mi ne konas* en *kiu iras tie*. Deze zinnen moeten afzonderlijk ontleed worden. *La viron* is een bepaling zonder voorzetsel van de eerste volzin. *Kiu* is onderwerp van de tweede volzin. 3) Ook: *drinkintaj*, waarbij men dan denkt aan het overmatig gebruik van sterke drank. 4) Niet: *ekabomeniĝis la festo*, d.i. het feest werd afschuwelijk. Ook: *la festo vigliĝis*. De woordjes: *ĝuste, jam, nun, nur* zijn niet juist in deze zin; in het Nederlands gebruikt men vaak woorden, die bij het overbrengen van tekst niet vertaald worden. Dat is het geval als de zin zonder zo'n woord niets aan betekenis verliest. In deze zin zou slechts *maljam* te gebruiken zijn, wat echter zelden voorkomt. 5) Niet: *kondutu vin; konduti* is *zich gedragen*, dus: *ik gedraag mij* is *mi kondutas*. Men bestudere nog eens de vorige lessen. Niet: *tamen, do;* zie: 4.

NEOLOGISMOJ

Neologismoj ĉerpitaj el literaturaj F.L.E.-eldonoj.

„LA LANTERNISTO", H. Sienckewicz kaj aliaj.

(Daŭrigo)

Eskvilina monteto — la plej alta el la sep montetoj de Roma
etiopoj — miksrasaj popoloj en Etiopio (Ethiopiërs)
etruskoj — popolo loĝinta en historia Etrurio (Italio) (Etrusken)
gotarda — derivita de „Gotardo", monto en Svisio
ĥasidoj — juda sekto en Polio (Chassieden)
jakutoj — mongola popolo en orienta Siberio (Jakoeten)
kviritoj — titolo de originaj civitanoj (Quirieten)
ligoj — germana gento loĝinta en orienta Germanio kaj okcidenta Polio (Lygiërs)
mamertinoj — fama korpuso de dungitaj soldatoj en Romio (Mamertijnen)
mastigoforoj — skurĝistoj
menhiro — prahistoria (megalita) kolono, konsistanta el unu aŭ pli da grandegaj ŝtonoj (menhir)
miceto — brazila simio (brulaap, Mycetes)
Moloĥo — biblia idolo, al kiu oni oferdonis vivantajn homojn; la vorto signifas „reĝo" (Moloch)
Olimpo — monto en Grekio, sidejo de la dioj (Olympus)
orkiso — evidente „orkideo" (orchidee)
pasato — vento kun difinita direkto, propra al certaj regionoj kaj sezonoj (passaat)
podlasa — derivita de „Podlasio", provinco en Polio
pretorianoj — fifama kaj potenca gvardio de romaj pretoroj, konsuloj kaj diktatoroj (Pretorianen)
ralo — stilzbirdo el la familio ĥaradriidoj (waterral, schriek, Rallus aquaticus)
rona — derivita de „Rono" (Rhône), rivero en Svisio kaj Francio
tesina — derivita de „Tessino", svisa kantono
torpilio — speco de rajo, kiu posedas organon povantan kaŭzi elektrajn skuojn (sidderrog, Torpedo)
tunguzoj — mongola popolo en orienta Siberio (Toengoezen)
utilitarismo — filozofia doktrino, laŭ kiu ĉiu ago estas juĝenda laŭ sia utilo por la socio (utilitarisme)
vestaloj — pastrinoj de la diino Vesta (Vestaalse maagden)
vomito — malsana inklino al vomado
Zeŭso — la plej potenca dio el greka mitologio (Zeus)

---

6) Niet: *malgrandan knabon;* dit is onderwerp. 7) Ook: *de tempo al tempo; kelkfoje;* niet aanbevelenswaardig is: *iam kaj tiam.* Niet: na *tempo al tempo* de uitdrukking *iafoje;* dan zegt men tweemaal hetzelfde, een pleonasme dus. 8) Niet geheel juist is *dum;* d.i. van begin tot einde. Niet: *pri;* dan geeft men antwoord op de vraag: *pri kio vi eraras?* 9) Ook: *Tradukante, mi de tempo al tempo eraras.* 10) Niet: *agendo;* d.i. een dagboekje voor aantekeningen, wat men in 't Ned. agenda noemt. 11) Niet: *pro;* d.i. wegens. Ook *pri.* 12) Niet: *estis;* d.i. een indirecte rede. 13) Niet: *imagas;* men heeft hier met een gebiedende wijs te doen. 14) Ook: *estro.* Niet: *ĉefo;* d.i. voornaamste. 15) Niet: *rompigis; rompi* is een overgankelijk werkwoord, bijv.: *mi rompas la glason;* maar: *la glaso rompiĝas.* 16) Niet: *per;* d.i. door middel van. 17) Ook: *ŝtormo.* 18) Niet: *fenestroj;* d.i. het gehele venster, dus met houten omlijsting. Ook niet: *vitroj;* waar *venster*ruit bedoeld wordt, vertale men *fenestrovitro.* 19) Niet: *rompis;* zie 15. 20) Niet: *konscias sin; zich bewust zijn* is *konscii,* zie 5. 21. Niet: *ĵus estas manĝonta; ĵus* is *zo juist, zo even;* bedoeld wordt *ĝuste,* wat niet fout, maar overbodig is. Ook: *intencas manĝi.* 22) Niet: *ĉesu; ĉesi* is onovergankelijk, bijv.: *la bruo ĉesis,* maar: *ĉesigu la bruon.* Niet: *haltu;* wel: *haltigu.* 23) Niet: *okazita;* d.i. een onovergankelijk werkwoord; slechts een overgankelijk werkwoord kan als lijdend deelwoord voorkomen. 24) Niet: *foruzita; foruzi* is *verbruiken,* bijv.: *li foruzis la tutan provizon.*

Beoordeling: A. J. G. te D. 8; Lupo 8; D. P. te A. 5; J. J. B. te D. 8; G. B. te Z. 7? Astor 9; E. A. B. te A. 9; J. C. M. te Z. 9; G. A. te R. 9; P. W. te Z. 6; H. J. H. te B. 9; C. v. B. te S. 7; A. B. te A. 7; P. W. W. te G. 7; J. A. V. M. 9; D. V. H. 9; A. A. D. te Z. 9; M. B. te H. 5.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

JAC. LEM.

Het scheelde weinig, of zij waren elkander naar de keel gevolgen.	Ili preskaŭ estis interbatalontaj.
Zulk een toon aanslaan tegen.	Uzi tian tonon rilate al.
Opschieten.	Rapidi.
Een oordeel vellen.	Prijuĝi.
Met zijn geest vertoeven.	Spirite troviĝi.
Zich het recht aanmatigen.	Uzurpi al si la rajton.
De zaak te ver drijven.	Puŝi la aferon tro malproksimen.
Er zijn mensenlevens mee gemoeid.	Homaj vivoj dependas de ĝi.
Namen noemen.	Citi nomojn.
Staan dralen	Prokrasti.
In gedachten verzonken.	Pensabsorbita.
Wij hadden moeten meenemen.	Ni estus devintaj kunpreni.
Dat zal je niet glad zitten.	El tiu suko ne estos kuko.
Dat moest hem juist overkomen.	Tio devis okazi ĝuste al li.
Hoeveel gaat er in die fles?	Kiom tiu botelo povas enhavi?
Denk je, dat dat wat hindert?	Ĉu vi opinias tion malhelpo?
Ramp.	Katastrofo.
Achterover geleund.	Aldorse sin apogante.
Zich met een grapje afmaken van....	Sin malembarasi el (de) .... per ŝercaĵo.
Te danken hebben aan.	Ŝuldi al.
Tegenover elkander.	Interkontraŭe; unu kontraŭ alia.
Lef hebben.	Aŭdaci.
Tussenbeide komen.	Interveni.

Opgave 11.

1. Je moet niet zulk een toon tegen hem aanslaan. Dat heeft hij niet verdiend. Vergeet niet, dat je veel aan hem te danken hebt. 2. Denk je (nu) werkelijk, dat je je overal met een grapje van kunt afmaken? Neen, vriend, dat zal je niet glad zitten. 3. Toen wij binnenkwamen, zat hij achterover geleund in zijn stoel, in gedachten verzonken. Klaarblijkelijk vertoeft hij met zijn geest in een andere wereld. 4. Zij stonden met gebalde vuisten tegenover elkander; het scheelde weinig of zij waren elkander naar de keel gevlogen. Het verheugt mij, dat je bijtijds tussenbeide bent gekomen en aldus een schandaal hebt vermeden. 5. Je moet de zaak niet te ver drijven. Noem mij de namen der schuldigen. Als je daar geen lef voor hebt, moet je liever zwijgen. 6. Ik zou graag met een buitenlander willen (vert.: *wensen*) corresponderen, maar ik schrijf nog niet zonder fouten. Denk je, dat dat wat hindert? Vooruit, mannen, schiet op! Staat niet langer te dralen! Iedere minuut is kostbaar. Er kunnen mensenlevens mee gemoeid zijn. 8. Ik kan niet dulden, dat iemand als hij zich het recht aanmatigt een oordeel over mijn daden te vellen. 9. Hoeveel water gaat er in de fles? Maar twee liter? Dat is niet voldoende. Wij hadden een grotere moeten nemen. 10. En dat moest hem juist overkomen, van wiens wilskracht en durf zoveel afhangt. Een grotere ramp zou ons niet hebben kunnen treffen.

Vertaling van opgave 10.

1. Ni ne tro anticipu la okaz(ont)aĵojn, sed precipe ni limigu nian atenton ĉe la nuna situacio (stato). 2. Amiko mia, ne faru al vi tiom da zorgoj. Vi komprenu liajn vortojn ne tro pezaj. Ne ĉiu batas, kiu tondras. 3. Ĉu vi estis tiom enlabora, ke vi eĉ ne povis respondi mian leteron? Kion vi do, pro ĉielo, far(ad)as? 4. Vi inspiris al mi bonan ideon. Mi ĝojas, ke mi agis laŭ via konsilo. Vi vidas: oni neniam estas tro aĝa (maljuna) por lerni. 5. Malkutimiĝu do de tiuj malĝentilaĵoj (krudaĵoj) kaj kondutu kiel konvenas al deca homo. Viaj malĝentilaj (krudaj) agmanieroj estas la kaŭzo, pro kiu ĉiu evitas vin. 6. La tempo kuracas multajn vundojn kaj igas, ke multe da suferita doloro mildiĝas, sed tamen la postrestintaj cikatroj ĉiam rememorigas nin pri tio, kio okazis. 7. Akra fumo enpenetris la salonon (penetris en la salonon). Subite ĉio trempiĝis en mallumon, kaj kiam iu (ek)kriis: „Brul(eg)o (Incendio)", estiĝis saĝperda paniko. 8. Silentu kaj eklaboru! Vi ĉiam metas vian snufan nazon en aferojn, kiuj ne tuŝas (koncernas) vin. 9. Ĉesu, mi jam komprenas: vi donas ovon por ricevi bovon; tamen, ĉe mi vi ne sukcesos. 10. Vi ne kredu lian babilaĵojn (al liaj babilaĵoj). Li opinias, ke li ĉion scias pli bone ol kiu ajn, sed li estas birdido, kiu ĵus

POR PROGRESANTOJ

J. VAN SCHEEPEN.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 11. Vertaal in Esperanto:

DE VREDE VAN MUNSTER.

Kort na de dood van stadhouder Frederik Hendrik volgde de vrede van Munster, waarbij èn Spanje èn het Rijk de onafhankelijkheid der Republiek erkenden (1648). De vaart op Oost-Indië en het verkeer tussen Zuidwest- en Noordoost-Europa was bijna uitsluitend in handen van de Hollanders. Hun visserij, zeewezen en manufacturen overtroffen die van elk ander land en in kapitaalrijkdom overtroffen zij misschien wel heel Europa. En deze materiële opbloei ging gepaard met een geestelijke, even ongemeen en voorbeeldeloos van vorm en inhoud en alleen te vergelijken met de even plotselinge en wonderbaarlijke rijkdom aan talenten in het Athene van de 5e eeuw vóór onze jaartelling.

Prof. Dr. J. Romein.

Vertaling van opgave 9.

ENVIINDA MEMOR(KAPABL)O.

D-ro J. Th. de Visser — de 1918a ĝis 1925a ministro pri Instruado, Artoj kaj Sciencoj 1), kaj antaŭ tio predikisto 2) en Amsterdam(o) — estis konsiderata ne nur kiel eminenta 3) katedro-oratoro 4), sed ĝenerale ankaŭ kiel unu el niaj plej elokventaj (ge)patrolandaj oratoroj. Nu 5), en 6) konfidenca 7) interparolo li iam 8) rakontis al mi, ke li neniam faras 9) predikon aŭ paroladon, kiun 10) li ne antaŭe laŭvorte 11) surskribis (escepte kiam li en debato tuj devis respondi). Li tamen neniam havis sian skribitan 12) predikon ĉe si, sed lernis ĝin parkere.

Post lia morto lia vidvino demandis al mi, ĉu 13) mi, kiel memoraĵon 14) eble 15) ŝatus 16) havi la manuskripton de la vasta 17) parolado, kiun ŝia edzo 18) iam okazigis pri grava temo antaŭ societo, kies prezidanto estis mi; kaj en tiu manuskripto mi laŭvorte 19) retrovis la paroladon, kiun De Visser, ne havante 20) ian noton ĉe si, faris. Ĉi tiu honorata oratoro estis neforigeble gravurinta en sian memoron ĉion, kion li estis dironta.

D. Hans (en „Vrije Geluiden.")

1) Men zegt niet: *sciindaĵoj* = wetenswaardigheden. 2) Ook: *predikanto*. In de practijk onderscheidt men: *pastro* = priester, geestelijke; *pastoro* = dominee. 3) Ook: *eksterordinara, bonega, perfekta*. 4) Ook: *eklezia oratoro*. 5) Niet: *nun*. Ook: *jen*. 6) Niet: *dum*. 7) Ook: *intima*. 8) Liever niet: *foje*, hetgeen eigenlijk „eenmaal" betekent. 9) Niet: *tenas*. Ook: *plenumas*. De directe rede kan zowel in de tegenwoordige tijd, als in de verleden tijd geluid hebben. 10) Niet: *kiujn*. „Kiun" heeft betrekking op „prediko" of „parolado". Als „aŭ" vervangen wordt door „kaj" is „kiujn" op zijn plaats. 11) Ook: *laŭlitere*. 12) Ook: *verkitan*. 13) Niet: *aŭ*. 14) Met *n*, omdat het in dezelfde naamval moet staan als „manuskripton". 15) Niet: *neofte*. 16) Ook: *volus, dezirus*. Ook de aantonende wijs (met *-as)* kan gebezigd worden. 17) Ook: *detala, granda*. 18) Niet: *viro*. 19) Een inzender beschouwt „laŭlitera" als bepaling van gesteldheid. Deze vorm is te verdedigen, doch men zal hem in de practijk niet tegenkomen. 20) Ook: *sen, ke li havis*.

Beoordeling: H. J. H. Jr. te B. 8; J. v. d. R. te R. 8; J. R. te A. 8; A. P. M. L. te G. 9; T. B. R. te A. 9; G. C. de G. te U. 5; F. v. d. M. te U. 8; A. B. te A. 7; C. J. P. te Z. 7; Lupo 8; A. J. G. te D. 7; A. A. D. te Z. 7; G. A. te R. 7; Kortbirdo 8; Th. de G. te L. 7; Alko 7; D. J. te A. 7; P. U. W. te Gr. 6; G. B. te Z. 6; E. A. B. te A. 9; Astor 8; J. C. M. te Z. 8.

LEEST DIT VOORAL NIET !

Als onze lezers reeds nu aan de abonnementsgelden voor 1950 wilden denken, zouden zij ons een groot genoegen doen. Dan is er grote kans, dat zij op tijd „binnen" zijn. Bij voorbaat dank!

ADMINISTRATIE.

---

rampis el la ova ŝelo (elrampis la ovan ŝelon).

Bonvolu korekti sur paĝo 76a, vert. van opgave 9, 11a linio de supre: *malŝparis* d.e. *malŝparas*. El la 13a linio de malsupre forstreku: *ĉiam*.

Beoordeling: H. J. H. Jr. en B. 9; P. M. W. en G. 6; E. A. B. en A. 9; Lupo 8; G. A. en R. 7; A. J. G. en D. 7; Astor 9; M. en U. 8; J. v. R. 8; J. A. V. en U. 5; C. B. v. G. en 's-Gr. 7.

LA HOMA KORPO

LA HOMA KORPO
B. Rijpstra

LA SKELETO
(Daŭrigo)

La membroj:

La supraj membroj nomiĝas brakoj. Brako konsistas el: humero, ulno, radiuso, karpeo (7 ostoj), metakarpeo (5 ostoj), fingroj (4 el 3 kaj 1 el 2 falangoj) (fig. 8).
Du iskioj (koksostoj) formas la pelvan zonon (fig. 9).

La subaj membroj konsistas el: femurosto, tibio, fibulo, patelo (genua osteto antaŭ la genua artiko), tarso (7 ostoj, metatarso (5 ostoj), piedfingro (4 el 3 kaj 1 el 2 falangoj).
La kalkaneo (kalkanosto) estas la plej granda osteto de la tarso.
La maleolo estas osta elstaraĵo (de la fibulo ĉe la ekstera, de la tibio ĉe la interna flanko de la tarso (fig. 10).
Koksosto konsistas el: iliumo, pubosto (antaŭe) kaj iskiosto (sube) (fig. 10).
La ostoj de la kapo:

la kranio: osta skatalo, kiu entenas kaj ŝirmas la cerbon;
la vizaĝaj ostoj. (Daŭrigota)

Falango = kootje (iu el la fingraj partoj)
femurosto = dijbeen
fibulo = kuitbeen
humero = opperarmbeen (liganta kubuton al ŝultro)
iliumo = darmbeen (la plej granda peco de la koksosto)
iskio = zitbeen
kalkaneo = hielbeen
karpeo = handwortel
koksosto = heupbeen
kranio = schedel
maleolo = enkel
metakarpeo = middenhandsbeenderen
metatarso = middelvoetsbeenderen
patelo = knieschijf
pubosto = schaambeen
radiuso = spaakbeen (la plej mallonga osto de la antaŭbrako)
tarso = voetwortel
tibi(ost)o = scheenbeen
ulno = ellepijp (kubutosto)


---

fig. 8




1. skapolo
2. klaviklo
3. humero
4. radiuso
5. ulno
6. karpeo
7. metakarpeo
8. falangoj

fig. 7



1. epistrofo
2. atlazo

fig. 9



1. spino
2. koksosto
3. femurosto

fig. 10.



1. koksosto
2. kokcigo
3. iskio
4. pubosto
5. femurosto
6. patelo
7. tibio
8. fibulo
9. tarso
10. metatarso
11. falangoj
12. kalkaneo

DE WERKWOORDEN

AFGELEIDE WERKWOORDEN

2. *Overgankelijk of onovergankelijk karakter van afgeleide werkwoorden.* (Vervolg)

Onovergankelijk zijn:

(ov. achter een woord betekent, dat dit woord volgens P.V. overgankelijk is.)

Abismi
Agonii
Akordi
Aksi
Aktori
Amasi
angori
Ankri
Arki
Aromi
Arpeĝi
asketi
aviadi
Bagateli
Bicikli
bigamii
Bildi
Bombasti
Burĝoni
Centri
Ceremonii
cirkli
Ĉefi
Danĝeri
Dekadenci
Deklivi
Dialogi
Distanci
Dueli
Efekti
Eĥi
Ekscesi
Ekskursi
Ekvilibri ov.
Embrii
Entuziasmi
Erupcii
Evolucii
Fajri
Fakti
Fami
Fantomi
Faŭki
Febri
Ferii
Fermenti
Fervori
Festeni
Fiaski
Flami
Flori
Flosi
Folii
Fonti
Friponi
Frosti
Fulmi
Fumi
Funebri x
Furori
Galopi
Gasti
Genui
Gesti
Gusti
Guti
Haladzi
Harmonii
Hejmi
Herezi
Inflami
Ironii
Jubilei
Kaprici
kaprioli
Karieri
Komedii
Komploti
Kompromisi
Koncerti
Konflikti
Kongresi
Konkursi x
Konsekvenci
Kontakti x
Kontrasti x
Konversacii
Konvulsii
Koti
Krepuski
Krimi
Krispi
Krizi
kulmini
Larmi
Mieni
Mizeri
Nebuli
Neĝi
Nesti
Nokti
Ofici
Okuli
Ondi
Opozicii x
Orakoli
Oratori
Origini
Paci
Pacienci
Paraziti
Patroli
Paŭzi
Pavi
Perli
Pioniri
Pivoti
Plezuri
Pluvi
Pompi
Ponti
Posteni
Printempi
Procesi x
Prujni
Pulsi
Radiki
Rajti
Reĝi
Revolucii
Rezignacii
Rezultati
Risorti
Riverenci
Rosi
sakrilegii
Salivi
Sangi
Sekrecii
Serpenti
Situacii
skii
Sklavi
Skrupuli
Stati
Striki
Ŝaŭmi
ŝtormi
Tamtami
Teksti
Temi
Tendenci
Tondri
Torenti
Trami
Tumulti
Uragani
Vapori
Veli
Venti
Zigzagi

3. *Werkwoorden van bijvoeglijke stammen afgeleid.*

Slechts enkele bijvoeglijke stammen zijn reeds van den beginne af ook als werkwoorden toegepast. Het zijn de stammen *atent', kuraĝ', kapabl', prav', ĵaluz', grav', neces', util'* en enkele andere.
Of er werkelijk verschil bestond tussen *esti atenta* en *atenti, esti kuraĝa* en *kuraĝi,* daaraan werd door de meeste esperantisten geen aandacht geschonken. Het gebruik van beide vormen, de bijvoeglijke en de werkwoordelijke, naast elkander werd als een gevolg beschouwd — en in zekere zin is het dat ook — van equivalente woorden in de nationale talen, waarin men meestal evenzeer voor twee verschillende begrippen twee vormen naast elkander gebruikt, een bijvoeglijke en een werkwoordelijke (in het Nederlands: *aandachtig zijn* en *opletten, moedig zijn* en *durven*).
Tot men zich opeens ging afvragen, of het in het logische stelsel van de Esperanto-grammatica geoorloofd is alle bijvoeglijke stammen tot werkwoorden te vervormen, zonder wijziging te brengen in hun betekenis, m.a.w., of men i.pl.v. *esti bona, esti bela, esti blanka* enz., evengoed zou mogen zeggen: *boni, beli, blanki.* Sommige esperantisten begonnen met een zeker genoegen zulke gezochte

werkwoorden toe te passen, zodat hun stijl in stede van vlot, vaak hinderlijk aandeed.
In de discussies over dit onderwerp gevoerd sloeg men blijkbaar geen acht op de reeds algemeen gebruikte afleidingen van bijvoeglijke oorsprong (*atenti, kuraĝi* enz.), anders had men moeten inzien, dat er wel degelijk verschil is tussen *esti bona* en *boni*, evenals er verschil bestaat tussen *esti atenta* en *atenti*. Immers, daar de bijvoeglijke naamwoorden meer dan de zelfstandige naamwoorden een duidelijk omlijnde groep vormen, kan het niet anders, of een verschil, dat in bepaalde werkwoorden daarvan afgeleid zo duidelijk tot uiting komt, moet ook bestaan bij andere afleidingen van bijvoeglijke naamwoorden, alhoewel dit verschil bij lang niet alle afleidingen zo goed merkbaar is. Daardoor is het ook te verklaren, dat men practisch maar zelden behoefte gevoelt werkwoorden van bijvoeglijke stammen af te leiden, behoudens dan de algemeen gebruikte en al meermalen genoemde afleidingen.
Maar juist omdat dit verschil bij alle afleidingen niet even duidelijk uitkomt, moet het verklaard worden uit *die* afleidingen, waarbij het *wel* duidelijk naar voren treedt, dus uit: *atenti, kuraĝi, kapabli* en dergelijke.
Dit verschil is als volgt samen te vatten:
Een bijvoeglijk naamwoord drukt een eigenschap of hoedanigheid uit van een zelfstandigheid.
Een werkwoord van een bijvoeglijke stam afgeleid drukt die eigenschap zelf niet uit, maar wel een handeling die onmiddellijk uit die eigenschap voortkomt of het stelt die eigenschap zó voor, dat zij a.h.w. als een werking wordt aangevoeld. Zo kan iemand de eigenschap *atenta* bezitten, maar zal daarom niet altijd die eigenschap door de handeling *atenti* uiten. Iemand kan *kuraĝa* van nature zijn, maar iets anders is het iets te *durven* (*kuraĝi*) doen, een werking, die uit de eigenschap *kuraĝa* voortvloeit. En zo zijn eigenlijk alle afleidingen van bijvoeglijke stammen te beschouwen.
Een muur, bijvoorbeeld, kan wit (*blanka*) zijn, maar hij kan evengoed die eigenschap helemaal niet bezitten, terwijl hij toch wit in het zonlicht uitkomt, dat er hel op schijnt, en dan mag men gerust zeggen *la muro blankas en la sunlumo*.
Een duidelijk verschil is er tussen: *la kampoj estas verdaj* (= de velden zijn groen, zonder meer) en *la kampoj verdas* (het groen van de velden komt indrukwekkend uit).
Hierbij moet nog opgemerkt worden, dat sommige grammatici de vorm *necesi* naast *esti necesa* afkeuren, alleen, omdat de stam *neces'* bijvoeglijk is. Dit motief is onjuist; wilden zij immers consequent handelen, dan zouden zij eveneens *atenti, kapabli, utili, kuraĝi, sufiĉi* moeten afkeuren, woorden, waarzonder men het practisch niet meer stellen kan. Alleen in zoverre bevat hun betoog enige waarde, dat men niet klakkeloos *necesi* mag schrijven, i. pl. v. *esti necesa*, maar beide vormen moet toepassen met het verschil hierboven aangetoond.

(Wordt vervolgd.)

OPINIOJ EL NIA LEGANTARO

Pri nia artikolo „For la akuzativo!" en la oktobra numero kelkaj legantoj esprimis sian konsenton. D-ro W. Manders skribis al ni: „Kun plena konsento mi legis vian artikolo „For la akuzativo! Mi ĉiam miras, ke iuj ne nur aplikas, sed eĉ postulas la akuzativon en similaj okazoj". S-ro M. C. Butler, la redaktoro de „The British Esperantist", skribis: „Mi gratulas vin pro viaj artikoloj „For la akuzativon!" kaj „Ĉu malpermesita aŭ nekonsilinda?"

Ni tre dankas pro aproboj de tiaj kompetentuloj; tio plifortigas nian opinion, ke ni ne estas sur erara vojo. La lingvo obeu siajn regulojn, sed ĝiaj aplikantoj ne faru el ili premajn katenojn!
Rilate al nia artikolo pri la akcento, en la marta numero, s-ro Butler atentigis nin koncerne unu el niaj ekzemploj: pa*per*korbo (ne *pa*perkorbo!), ke angloj prononcas *pa*perkorbo. Tia fakto pravigas nian opinion, ke la kromakcenton ofte influas la propra nacia lingvo. Anglo akcentas *pa*per, nederlandano pa*pier*; kaj estas nature, ke same ili transmetas sian propran akcenton en Esperanton, respektive *pa*perkorbo kaj pa*per*korbo. La diferenco ne gravas, sed kiu por si mem preferas regulecon, tiu devas neglekti la nacian influon kaj konservi la originan akcenton de la radiko, do: pa*per*korbo, le*ter*kesto k.s.